# REVENOS LA TRANSMARULOJ EN EDINBURGON

**La programo por la Edinburga konferenco en majo formiĝis. Nove anoncitaj prelegantoj estas denaskaj britoj, kiuj tamen loĝas dum jaroj ekster tiu lando, kaj kunportos ion de siaj nunaj hejmoj kun si.**

**Andrew Weir**, eksprezidanto de la Esperanto-Asocio de Skotlando, laboras kiel lekciisto en la fako de la angla lingvo ĉe la Norvega Universitato de Scienco kaj Teĥnologio, Trondheim.



Andrew Weir

Li prezentos la temon **Lingvo: kio diferencigas nin de la bestoj?** Klarigas Andrew: *Multaj bestoj povas komuniki unu kun la alia. Sed kompleksan, riĉan, kreivan lingvon havas nur homoj inter la animaloj. Ĉu la homa lingvokapablo estas nur kvanteca malsama de la kapabloj de aliaj animaloj—aŭ ĉu io vere speciala distingas homojn? Kiel la lingvokapablo unue evoluiĝis en homoj? Ĉi tiu prelego prezentos en neformala, neteĥnika maniero ĉi tiun debaton, kiu lastatempe furiozis en la lingvistika, antropologia kaj biologia mondoj.*

Ja interese, kiel ankaŭ lia dua prelego, kiu miksas liajn hejmlandojn nunan kaj denaskan: **Lingvaj bataloj en Norvegio kaj Skotlando: nynorsk ("nov-norvega") kaj la skota lingvo**. *En 1814 sendependiĝis Norvegio de Danio. La nova nacio frontis elekton: kiun lingvon oni uzu? La norvegan lingvon, kompreneble; sed ekzistas pli ol unu norvega lingvo. Ni vidos kiel la "nov-norvega" estis kreita de la lingvisto kaj folkloristo Ivar Aasen. Sed ni vidos ankaŭ ke la du elektitaj lingvoj ne ĉiam feliĉe kunekzistis, nek kunekzistas. Ni do konsideros la "lingvajn batalojn" en Norvegio—kaj ankaŭ konsideros ĉu estas iuj paraleloj kun la angla kaj skota lingvoj en Skotlando.*

## HYGGE

Ankaŭ nin distros **Betty Chatterjee**, kiu dum 43 jaroj loĝas en Danio kaj prezentos la danan fenomenon kulturan **Hygge**: Hygge *estas unu el la plej ofte uzataj vortoj danaj. Laŭvortare ĝi signifas agrablecon, komforton, hejmecon kaj intimecon. Tamen danaj esperantistoj preferas uzi la ruslingve devenan vorton ''ujetno'', ĉar ili opinias, kiel la plejparto da danoj, ke la vorto* hygge *estas ne tradukebla, ĉar* hygge *estas ununura dana fenonemo.*

*La 16-an de novembro Oxford Dictionaries elektis la vorton* hygge, *kiel unu el la plej uzataj vortoj en Britio. Plue laŭ esploristo ĉe Happiness Research Institute en Kopenhago,* hygge *estas la fundamento de feliĉo, kaj la dana popolo estas la plej feliĉa popolo en la tuta mondo.*



Betty Chatterjee

Kiel vi legis en la antaŭa Update, ankaŭ la ĉefgastpreleganto vojaĝos el alia lando. **Viktoro Solé** estas kataluno kaj prezentos du prelegojn dum la kongreso. La unua titoliĝas **Kial mi ne ŝatas la muzikon de La Espero**, en kiu li, kun la orelo de fakulo pri muziko, klarigos sian opinion, ke ĝi ne taŭgas kiel himno por la Esperanto-movado.

En la dua prelego, **Mansignado por Esperanto**, li proponos tre simplajn mansignojn kiel helpilon por la lernado de Esperanto, similajn al helpiloj, kiujn muzikistoj sisteme uzas en la lernado-instruado de muziko.

## DISCOUNT FOR OUR LEARNERS

It's lovely to see new faces (more new people than veterans, so far!) coming to Edinburgh. But we'd love to see even more, especially our new friends who have participated in our events *Lernu* and *Lernu Plu*.

If you've taken part in one of those sessions in the 12 months prior to signing up, we'll give you a £10 discount. Contact us rather than sign up on the site, and we'll sort it out with you. *Ĝis Edinburgo!*




**La kunkongreso ofertas pli ol la ĉi-supraj prezentoj, kiel ankaŭ la lastatempe tradician bonfaran kvizon en la malferma vespero kaj komedian kvizon.**

Vespere post la fermiĝo oni kunvenos por **grupa manĝo** en loka restoracio. Kaj la lundon oni faros **ekskurson** per la **nove refarita fervojo Borders al Tweedbank**, kaj poste vizitos la apudan **Abbotsford**, hejmon de Sir Walter Scott.

La kunkongreso okazos **de vendredo la 19a de majo ĝis dimanĉo la 21a** ĉe **The Melting Pot** (5 Rose Street, Edinburgh, EH2 2PR—**themeltingpotedinburgh.org.uk**), troviĝanta nur 2-minutojn piede for de Princes Street kaj 5-minutojn for de stacidomo Waverley, en la koro de Edinburgo.

La baza kotizo estas £48, kun pluslunĉa versio kontraŭ £60. Transmaraj vizitantoj rajtos partopreni senpage.

**Mendu vian lokon ĉe britakongreso.org** aŭ per telefonvoko al la oficejo.





esperanto.org.uk • eab@esperanto.org.uk • ISSN: 1741-4679 • Charity Number: 272676

**The team behind Amikumu, an app which will help language learners locate each other, sat down together over new year at the event JES in Waldheim am Brahmsee, Germany. This was the first time that the project's founders had met in the flesh.**

The programmers worked together ironing out problems on the version for iPhone and Android, and gave people in attendance their first glimpse at a project that will solve the century-old conundrum of learning Esperanto but not being able to find other people who speak it.

The project is running according to schedule and is now undergoing alpha testing. When the app launches it will have an Esperanto and English interface and be usable only for people learning Esperanto, before being rolled out to more languages. That will be in July if things continue to go well.

EAB have financially supported the app and is a named sponsor, behind UEA, which is the official sponsor of Amikumu.




**We were sorry to receive news in between issues that Kate Hall and Muriel Shackleton had passed away. We will feature obituaries on them, both Esperantists and contributors over the course of many decades, in the next issue of *La Brita Esperantisto*.**

Kate was my predecessor's predecessor in the Norwich Jubilee Esperanto Foundation and had close ties with Africa, editing *La Afrika Reto*, a journal for Esperantists in Africa who had an interest in literary composition. The NoJEF trustees, in memory of Kate, therefore chose to support the first *Internacia Junulara Kongreso* in Africa.

It will take place in Togo in August and the Tutmonda Esperantista Junulara Organizo has set up a crowdfunding page, following the success of Amikumu, to help finance it. The donation, which covers the cost of somebody from a neighbouring African country participating the event, means that EAB is now a sponsor of the event.

Unfortunately, the donation in Kate's memory hasn't spurred more people to do the same, unlike EAB's donation to Amikumu. In the two months since the page was launched only 18 people have donated, our donation covering 60% of the total. If you'd like to leave your own donation to support the event, you can do so at **espinfo.org/ijk-2017**.

***

February 21st is **International Mother Language Day** and UEA has prepared posters in several languages, including English, Esperanto and Welsh. If you'd like to support the event, maybe by using the posters on social media or printing copies to go into your local library, you can download them from **espinfo.org/gepatra-lingvo**.

***

If we have your email address or you follow our social media accounts, you will have seen that the trustees have requested that interested parties submit a tender for a part-time position within EAB. This has been something that the trustees have been discussing internally since 2015, and I alluded to it in Update 72, stating that the trustees decided to convene a special meeting at which Clare and I would not be present in which to discuss it. They presented their finished proposal in December and I informed them that I would be interested in applying for the role, so stepped down as a trustee at that point. The role has been advertised in local press and via our social media, and interviews will take place at the next trustee meeting. If I should be the successful candidate and the Charity Commission approve a subsequent appointment, the charity won't be worse off regarding the number of trustees, because somebody else who has something to offer and has been attracted back to EAB within the last years because of the positive work he has seen online has agreed to stand as a candidate in my stead.

The trustees have asked me to clarify, following some queries, that the wording in the application "unsupervised" is meant in the context of "working independently", just as Viv does, where she prioritises her workload without the need for a manager to tell her what to do each day, and that reference to tasks "traditionally" done by the treasurer refers not to tasks that one would *expect* a treasurer to do, but admin ones which happen to have been done by EAB's treasurers, such as communicating with UEA in Esperanto or calculating the stock provision. The trustees still have their legal responsibility of oversight for the charity and will carry it out, and the charity will still be happy to receive assistance from volunteers.

And on the subject of volunteering ... perhaps somebody out there would like to offer to run the 2018 conference? It's been several years since we've received an offer and didn't have to take charge of it ourselves.

We've also requested in several issues of Update and in the previous two AGMs that somebody volunteer to be our *komitatano A* with UEA, and the offer of free attendance at the Universala Kongreso hasn't been enough to entice somebody. Edmund Grimley Evans, another trustee, is now sitting in that spot so that it doesn't continue to go vacant, and is following online committee discussion, but we know that he won't be attending the UK and so the committee meetings there, so this isn't ideal. If you would like to stand in for Edmund at the next and subsequent UKs or even occupy the role itself, please get in touch.

Finally, I would be *very* happy to hand the reins of Update over to somebody else. If you'd be interested in the editor's job, please do let me know.

**Tim Owen**

## COURSES FOR 2017

**Our first session of *Lernu* and *Lernu Plu* of the year will take place on March 11th and 12th at Esperanto House.**

As usual, the event will be free to attend and we'll be primarily marketing it to people who are learning Esperanto online or through our correspondence courses.

The teachers leading this session will be Tims Morley and Owen. We'll arrange further sessions for later in the year. You can find more details and register at **esperanto.org.uk/events/lernu**.

***

One thing that became very clear at our last session of *Lernu Plu* is that we have graduates who, through their own success, unfortunately can't come back. It was lovely to be able to guide our new arrivals through the office and have them witness people who were themselves beginners only a year ago chatting to one another quite comfortably. They've outgrown the course and need something else now.

To fill the breach I'm trialling a one-day ***progresanta*** course at the YMCA in London on **March 18th**. If you're a little bit beyond being a beginner, haven't attended courses beyond *Lernu Plu* before, and think you might like to come, please get in touch with me. There'll be a few set exercises but I'll also be handling a few ticklish requests given to me in advance. The course will be free to attend. You can find more details and register at **esperanto.org.uk/events/postplu**.

***

And we'd be happy to see those of you who have a bit more experience at our **Somerlernejo** at Barlaston, where Jack Warren and Hilary Chapman will be the tutors in residence. Jack will be taking his traditional *meznivela* group, whilst Hilary works with those of you who are advanced in Esperanto. *Somerlernejo* will take place at Esperanto House on **August 19th and 20th** and will be free to attend. Get more details (including sample exercises) and register your interest at **esperanto.org.uk/events/somerlernejo**.

**NEW MEMBERS** Mr C Bohoris (Eastleigh), Mr D J Foskett (Southampton), Alison Mecham (Nottingham), Noel Howlett (Nantwich), A Wright (Dudley), Brian Haddon (London), Heather Eason (Cardiff) **DECEASED MEMBERS** Dr Kate Hall (Aylesbury), Muriel Shackleton (Bradford) **COMPLETED THE FREE TASTER COURSE** Don Murray (Bracknell) **EXAM CONGRATULATIONS** Samantha Poynter (Newport: advanced written exam—merit)



**Britio kontribuis al UEA nur 101 membrojn tiun jaron. Aliĝi apenaŭ kostas, se oni elektas la plej malmulte kostan eblon.**

UEA certe bezonas helpon. Parte pro la natura falo post la jubilea kongreso en Lillo (pluraj centoj da homoj membriĝis simple por ricevi rabaton por la UK-kotizo) kaj parte pro lastatempa decido ne plu aŭtomate renovigi *senpete* membrecon de homoj el nepagipovaj landoj per la fonduso Kanuto, okazis granda ŝrumpiĝo. Laŭ informoj de ĝia sekretario, 3018 personoj pagis kotizon en 2016.


Do, ni rememorigas vin, ke membreco de UEA daŭras la kalendaran jaron, kaj nun do estas la ĝusta momento realiĝi. Sube ni prezentas al vi la plej komunajn membro-kategoriojn. Eblas aliĝi al UEA ĉe ties retejo (**espinfo.org/join-uea**) aŭ per Viv en la oficejo.

**UEA-MG (£8):** Individua membro, kiu ricevas nur la Gvidlibron tra la Esperanto-movado plus la revuon Esperanto (11-foje en la jaro) rete.

**UEA-MJ (£20):** Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron plus retan version de la revuo Esperanto (11-foje en la jaro). Ricevas ankaŭ Kontakto (6-foje en la jaro) homoj sub 30 jaroj.

**UEA-MA (£50):** Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto (11-foje en la jaro) paper-versie.

Utilas scii, ke membroj de UEA ricevos 10%-an rabaton kiam ili uzas la ĉeretan katalogon (**espinfo.org/uea-katalogo**). MG kaj MJ rajtas uzi la rabaton dufoje jare; la aliaj kategorioj ĉiufoje.




## ABONOJ AL LA ESPERANTA GAZETARO

**La redaktora skipo de la *Ondo de Esperanto* ekde nun eldonos la long-daŭran ĉiumonatan gazeton nur elektronike. Kaj ni baldaŭ vidos la unuan ekzemplon de la nova *Heroldo de Esperanto*, nun sub nova redaktado, kaj ankaŭ disponebla en reta versio (kvankam daŭre aperos ĝi surpapere).**

Oni povas al ili aboni por la tuta jaro ĉe ties propraj retejoj: **sezonoj.ru/la-ondo** kaj **heroldodeesperanto.com**. Tutjara abono al Ondo kostas 15€ kaj disponeblas senpaga provnumero. Por Heroldo ekzistas pluraj kategorioj, plej malmultkoste 13€ por kvar-monata provperiodo, ĝis 29€ por la tuta jaro rete, 59€ rete kaj papere.

Ekzistas pluraj aliaj, ĉiuj en papera formato—ili atingos vin perpoŝte, kaj afranko inkluziviĝas en la abono. Sed ankaŭ ciferecaj versioj ekzistas de *Monato* kaj *Juna Amiko*, kaj tiel la kosto malaltas kaj livero tujas.

Se vi deziras aboni kelkajn, bonvolu senti libera kontakti Viv en la oficejo kaj peti helpon.




**Monato** (Aere £49, surface £46, rete £27.60) Magazino pri internaciaj aktualaĵoj. Ĝiaj raportoj pri okazantaĵoj verkiĝas en la landoj, kie ili okazas. 32p, 11-foje en la jaro.

**Kontakto** (£19) "En Esperanto sed ne pri Esperanto", publikigata de TEJO kaj plena de temoj interesaj al junadultoj esperantistaj. 6-foje en la jaro. (Ricevas tion senpage membroj de UEA en kategorioj UEA-MJ or UEA-MA, se ili malsuperas 30 jarojn.)

**La Gazeto** (£25.50) Internacia kultura magazino, kiu okupiĝas pri ĉiaj fundamentaj aspektoj kaj kulturoj rilate la Esperantan mondpolitikon. 32p, 6-foje en jaro.

**La Jaro** (Aere £8, surface £5) Poŝlibro por la jaro, kiu enhavas etan enciklopedion pri detaloj (statistikoj, naciaj ferio-tagoj, ĉefurbo ktp) pri ĉiu lando. 1 eldono en la jaro.

**Juna Amiko** (Surface £14, rete £13) Magazino por junaj Esperantistoj, kiuj jam scias la bazojn de la lingvo. La legaĵoj estas facile kompreneblaj en simpla klara stilo. 32-36p, 4-foje en la jaro.

**La KancerKliniko** (£22) Humura satira gazeto trimonata, sindiranta "politika, kultura, skandalema, ajnista", kiu ekaperis en 1976. 28p, 4-foje en la jaro.




**Our AGM will be held during the conference in Edinburgh and with it will come the election of trustees for the next year. It might not sound a terribly exciting subject but it's a necessary one to broach, since no trustees means no EAB. So, we'd like you to give some consideration about whether you would have something to offer.**

Trusteeship is a serious and necessary role, without which a charity cannot remain operational. It's important that we introduce new trustees periodically rather than rely indefinitely on those currently in place. It's particularly urgent that we find somebody willing and able to sit as treasurer. If that's a role where you could see yourself, please do let us know.

EAB's trustees communicate primarily by email and meet up to five times per year. They may choose to get involved in special projects or areas of interest, working on their own, in subgroups with other trustees or with other volunteers. Several of the trustees carry titles indicating specific responsibilites, such as secretary or treasurer, but all are equally responsible in law for the good governance of the charity.

If you think you might be interested in volunteering as a trustee, please do feel very welcome to get in touch with any of us for a chat. You can get our contact details from Viv or by visiting **espinfo.org/trustees**. The Charity Commission's guidance is downloadable at **espinfo.org/essential-trustee**.

To become a candidate, please send an email to Viv informing her that you wish to stand, and indicating the names of two members who have agreed to propose and second you. Please also copy these members into your email, and send it to arrive by the **24th of February**, please.

**Malmultas kontribuoj por la venonta eldono de *La Brita Esperantisto*.**

Ni interesiĝas pri artikoloj kaj bildoj, kontribuoj pri homoj kaj historio esperantistaj, pri humuraĵoj kaj bildstrioj, pri viaj grupoj kaj aranĝoj. Per la helpo de nia enpaĝigisto, Simon Davies, ni povos prezenti ĉion tre bele, sed tutunue necesas ricevi interesindan materialon.


Ni memorigas vin, ke la nuna redaktada aranĝo estas nur provizora, kaj invitas al homoj, kiuj interesiĝus pri la redaktora rolo, esprimi sian kandidatecon al **ian.carter@esperanto.org.uk** aŭ **tim.owen@esperanto.org.uk**. Ĝis nun ni ricevis neniun proponon kaj do daŭre plenumos la rolon mem.



Por ĉiu eldono de Update **Jack Warren** preparas krucenigmon bazitan sur iu aparta temo. Jack celas, ke vi amuziĝu kaj eble lernu kelkajn novajn vortojn aŭ eĉ rememoru pri kelkaj iam forgesitaj. Vi povos kontroli viajn respondojn en la venonta eldono de Update.

# KRUCENIGMO: LA ĜARDENO

**Grava informo:** Ĉiu vorto estas substantivo kaj konsistas nur el la radiko, sen la o-finaĵo. Do se la respondo al la helpilo estas *esperanto*, aperos en la enigmo la vortformo *esperant*.




Respondoj al la antaŭa krucenigmo
Horizontale: 4 afid, 7 mant, 8 lokust, 9 nest, 14 flugil, 16 krabr, 17 abeluj, 18 pikil, 19 torak
Vertikale: 1 ovari, 2 blat, 3 anten, 5 drozofil, 6 vesp, 10 skarab, 11 formik, 12 elitr, 13 larv, 15 gril, 16 kul

HORIZONTALE
1 - necesas forigi ilin, 6 - malbonodora, sed ĝi nutras plantojn, 6 - malbonodora, sed ĝi nutras plantojn, 8 - malalta ligneca planto, 10 - eltiranta ilo, 14 - bela floro kun dornoj, 15 - manĝebla ĝardena herbo, 16 - tubera radiko, 17 - bonodora plurjara herbo , 18 - varma loko por sentemaj plantoj

VERTIKALE
2 - kun dentoj, por kolekti foliojn, 3 - grundo preparita por plantoj, 3 - grundo preparita por plantoj, 4 - tondita herbejo, 5 - ŝatata insekto , 7 - malamiko de ĝardenisto, 9 - hejmfarita plantnutraĵo, 11 - por verŝi, dum somero, 12 - ĝi ekkreskas subgrunde, 13 - por turni la teron

## RAISE MONEY FOR EAB ... EASILY

**Donations are one thing (and always welcome, of course) but they *cost* you something. Wouldn't it be great to donate *costlessly*? It's easy to do!**

The government operates a Gift Aid scheme, which allows UK charities to claim back the basic rate tax already paid on donations by the donor. This means we can claim back from the government on your behalf 25p for every £1 donated, boosting the value of the donation or subscription by a quarter. It's free money!

Although our membership subscriptions are up our income from Gift Aid has fallen by 13% because fewer people have signed up for Gift Aid with us. If you're not sure whether you have or whether your previous instance might have expired (the limit is ten years), please take a moment to visit **espinfo.org/gift-aid** and complete a new declaration, or contact Viv in the office.

You can also raise money whilst shopping online, using a website called **easyfundraising.org.uk**. We first came across the idea in the AGM, when Elizabeth Stanley brought it to our attention. You nominate a charity, then when you visit an associated site, part of what you spend is donated. Easy peasy.

We wrote about it in Update 74, explaining that all you had to do was visit the site, create an account, and nominate Esperanto-Asocio de Britio as your charity. Responses haven't been great. Five people have created accounts, only three have raised anything. Let's see some different names at the top of the leaderboard, please—it's easy and costless.

Top Supporters

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Clare H. | £38.93 |
| 2 | Tim O. | £14.28 |
| 3 | Stuart M. | £1.00 |

## A VAT ON THE BACK

**Just like buses, you wait ages for a VAT inspection, then two come at once. OK, *waiting* for one is a bit of a stretch. But we've had two in close proximity when nobody can remember one beforehand. And we've passed it with flying colours.**

The inspector said that it was helpful that everything was so well prepared and that well-maintained records make her job a lot easier. She was happy to see that we'd complied with the few changes we were told to make at the previous inspection and that everything was being done correctly. She checked the accuracy of some VAT returns submitted and was happy that they were accurate too.

These things don't happen by themselves, of course, but through the diligent stewardship of Viv, who steers us through the tax minefield. Well done, Viv, and also to Clare, who has led us successfully through the annual independent examination of the accounts which we're required to have every year.

Esperanto Association of Britain

Update is published four times a year and complements the Esperanto-only magazine *La Brita Esperantisto*.

Esperanto House
Station Road
Barlaston, Staffs
ST12 9DE

+44 (0)1782 372141
0845 230 1887

esperanto.org.uk
eab@esperanto.org.uk
@esperanto_uk
esperanto.uk